

## ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
WYDAWCAREDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZYAPERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI.  
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.*Ignacy Jan Paderewski.*

Proksimiĝas grava por tuta Polujo jubileo, Warszawa, Kraków kaj aliaj urboj faras preparojn por inde ĝin festi. Por festi nome la komencon de kvarcentkvarono en la vivo de granda artisto, geniulo kaj patrioto, al kiu Polujo ne sole la famon ŝuldas.

Ignacy Jan Paderewski, naskita la 6-an de novembro 1860 j. en bona vilaĝpalaco de Kuryłówka en Podolio en la antaŭtempo de nova, pola insurekcio, kreskis en patriota atmosfero de sia hejmo laŭ inspiroj de sia patro Jan, energia bienadministranto, kaj la patrino el la familio de universitatprofesoro Nowicki, ekzilita en Siberion. Bedaŭrinde la patrino tre frue mortinte, postlasis Ignacjon ankoraŭ infano kaj la patro, suspektata de cara reĝimo pro sia patriota agado, devis forlasi sian postenon kaj elmigris en Wołyń, en la vilaĝon Sudyłków. Tie ĉi kreskante komencis juna Paderewski kun sia fratino Antonjo siajn lerneajn jarojn. Unua lia instruisto en la pianludo estis s-o Runowski, poste Piotr Sowiński, de post la j. 1872 troviĝis Ignacjo en Warszawa kaj studis muzikon en la Varŝava Muzikinstituto en la klasoj de prof. Śliwiński, Strobl, Janota, Schlözer, Roguski. Fininte la studojn, li ricevis tuj en la sama Instituto la postenon de instruisto. Tio influis forte la maturiĝon de lia animo kaj konsciigis al li la seriozecon kaj respondecon de lia laboro. Li pensis tamen ĉiam pri perfektigo en sia arto. La instruista

posteno ebligis al Paderewski edziĝi al f-ino Antonina Korsakówna, kiu tamen baldaŭ mortis. Tiu sortbato igis junan profesoron (21-jaraĝan!) pli profunde kaj pli serioze konsideri sian destinton kaj estontecon. La konkludo estis, ke Paderewski, decidinte ordigi kaj fortigi sian scion, iĝis studanto en Berlina Muzikakademio en la manoj de prof. Friedrich Kiel, ĉe kiu studis ankaŭ Poloj: Górski kaj Noskowski.

La komponista agado de Paderewski komenciĝis jam tre frue, sed la dolĉeco kaj ravo de serioza laboro estis kaŭzo, ke li rezignis definitive la postenon en Warszawa kaj de post la j. 1883 serĉis pluan pliriĉigon de sia animo kaj scio en la muzikstudado en Berlino ĉe Heinrich Urban. Nun li studis enfunde ne nur la teoriajn muzikbranĉojn (la instrumentadon, komponicion, muzikajn formojn), sed perfektigis sin ankaŭ en la ludtekniko mem.

La jaro 1884 tiras lin en Vienon, al fama tiam prof. Leszetycki, ĉe kiu li pasie ekzercas sian pianludon ĝis la jaro 1887, en kiu tiujn studojn finiĝis granda koncerto en Vieno de nekonata ĝis nun ludisto, kiu tamen ekbrilis tuj kiel nekomporebla virtuozo; la programon dividis kun Paderewski la famega kantistino Paolina Lucca. Intertempe vizitis Paderewski Polujon kaj koncertis en Lwów, Kraków, Warszawa; en Zakopane li kolektis la popolajn melodiojn, ludatajn de populara violonludisto (Bartek Obrochta)

kaj eldonis ilin en la volumo: Tatra albumo.

Tiel finiĝis la studa epoko kaj venis nova: la epoko de komponisto kaj koncertisto, dum kiu Paderewski loĝante en Parizo faras ekskursojn kun koncertoj en Anglujon, kolektante ĉie aplaŭdojn.

Depost la j. 1893 entreprenas Paderewski vojaĝon en Amerikon, koncertas en New York kaj en multaj aliaj urboj. De nun komenciĝas triumfa periodo de la artisto, ravanta per sia ludo kaj figuro (oni nomis lin arĥanĝela vizaĝo) la aŭskultantojn en Francujo, Anglujo, Holando, Ameriko, Italujo, en Warszawa kaj Rusujo.

En la j. 1899 aranĝas Paderewski al si rezidejon en Svisujo ĉe Lemana lago apud la urbeto Morges kaj edziĝinte al f-ino Heleno baronino Rosen faras el sia vilao centron de riĉa artista, politikista kaj altsocietana vivo.

La jaro 1901 alportas la unuan prezentadon de lia opero Manru en Dresden. Ĉeestas la majstro mem kaj multaj gastoj el Polujo. 10 tagojn poste prezentis la saman operon la teatro en Lwów. Granda entuziasmo regis en la teatro, la atmosferon solenigis la personoj de aktoroj, inter kiuj la titolan rolon kantis fama Aleksander Bandrowski, kreante modelon por ĉiuj sekvantoj; la rolojn partoprenis la kantistinoj: Zboińska - Ruszkowska, Kasproiczowa, Strassern. La tutan sezonon estis sukcese prezentata tiu opero en Lwów, kaj dum some- ra vojaĝsezono en Kraków, disvastigante famon kaj amon al Paderewski.

La sukcesoj sekvis la prezentadon de tiu opero ankaŭ en Ameriko dum la sezono 1901-2 en la New-Yorka Metropolitan Opera-House, en Filadelfia, Boston, Pittsburg, Baltimore, Ĉicago. La koncertaj vojaĝoj de la majstro atingis novajn kontinentojn: Aŭstralion kaj direktiĝis tra Ameriko ree en Eŭropon.

Intertempe la politika ĉielo malsereniĝadis, estis aŭdeblaj revoluciemaj postuloj (en Rusujo). Paderewski ĉiam enfunde sentema por sia patrujo (subpremata tiam de tri dispartigaj potencoj) laboris en siaj rondoj por eligi en la mondo la komprenon por ĝia revivigo, lia hejmo sur neŭtrala svislanda teritorio iĝis kunvenejo ne nur de famaj ge-artistoj, sed ankaŭ de mondaj politikistoj. Tiuj kunvenoj havis tre gravajn konsekvencojn: Paderewski gajnis tiamaniere ĉiam pli grandajn kaj decidpovajn rondojn por sia politika vicpunkto, kulmi-

nanta en la signaivorto: „Poluj' ankoraŭ ne pereis!“, kies melodion li enplektis kiel motivon en sian faman Simfonion.

Venis tiel grava por la pola nacio jaro 1910. Estis preparata en Kraków granda festo de ĉiuj polaj „Falko“-societoj por solena memorigo de 500-jara datreveno de pola venko sur grunvalda kampo. Paderewski decidis aldoni sian signifoplenan parton al ĝia sukceso: li donace fondis al la subvavela; spirita ĉefurbo pola la monumenton de grunvalda venkinto: reĝo Władysław Jagiełło, ĉizitan de eminenta artisto Wiwulski. La tiama parolo de donacinto el sur la monumenta bazo dum malkovra festo, aŭskultata de kelkdek mila ĉeestantaro subigis al li ĉiujn korojn kaj levis lin en ĉies animo al la rango de ambasadoro de pola — senŝtata tiam — nacio.

Ripetiĝis laŭvice novaj vojaĝoj, disportantaj la famon de Paderewski jam tra ĉiuj kontinentoj, eĉ en malproksima sudafrika Kaplando. Kaj dume elĝermiĝis kaj maturiĝadis en la mondo ia neklara konflikto, kiu poste tra la rusa-japana kaj balkana milito eksplodis fine kiel mondmilito. La enflamiĝema, patrujon ĉiam spiranta koro disponigis sin kaj sian hejmon por politika agado, kies celo povis esti nenio malpli, ol vera reakiro de sendependa ŝtato. En lia vilao estis organizita „Helpkomitato por Poloj“, kiun en Eŭropo reprezentis Henryk Sienkiewicz kaj por la Ameriko estis elektita Paderewski. Lia ĝisnuna famo multe helpis por favora inklinigo de aŭtoritatuloj — inter ili de usona Prezidanto Woodrow Wilson — por polaj aferoj. Certe tiu fakto pezvaloris multe ĉe la versajlaj pactraktadoj, kies rezulto interalie estis rekreo de Polujo. Por la milita tempo fermŝlosis Paderewski sian pianon kaj dediĉis sin al la porpatruja servo. En la jaro 1919 li organizis la polan ŝtaton en la karaktero de ministroprezidanto, sed post unu jaro li ekŝiĝis kaj forveturis Amerikon por ripozoj kaj rekomenci sian servon al la arto.

Depost la j. 1922 Paderewski koncertas en multegaj urboj kaj ŝtatoj, farante tion multfoje por la bono de militsufrintoj; lia koncerto iĝas ĉiam ĝuo por la aŭskultantoj, lia apero sur la estrado levigas ĉiun el la seĝo, ankaŭ la regnantojn, kiuj tiamaniere volas esprimi sian homaĝion ne nur al granda artisto, sed ankaŭ al granda spirito.

Nune pasigas Paderewski la vivon en sia vilao en Svisujo, forlasante ĝin por

vintra koncertsezono. Dum la kunvenoj de Ligo de Nacioj lia hejmo ĉiam svarmas pro vizitoj de ĉiuj eminentuloj kaj liaj privataj kun ili interparoloj tre efike influas por enigi en la pensojn de decidpovaj politikuloj la vidpunkton kaj intereson de Polujo.

Restas ankoraŭ priparoli la verkadon de Paderewski kaj iom skizi lian artistan vizaĝon.

Estante pianisto, li skribis siajn komponaĵojn unuavice por piano, kiaj estas ekz. kapricioj, variacioj, fantazioj, polaj dancoj, humoresko; tre populara iĝis lia Menueto (ludata ankaŭ je ĉiuj solo-instrumentoj). Li eldonis ankaŭ koncertojn por piano kun orkestro, komponaĵojn al tekstoj de Mickiewicz kaj Catulle Mendès kaj faman operon „Manru“, bazantan enhave sur la romano de Kraszewski: „La ekstervilaĝa kabano“.

Kio karakterizas Paderewski'n kiel artiston kaj verkiston?

Ĝisfunde instruita li iras sian propran vojon, liaj verkoj spiras precipe karakteron polecan kaj lirikan; li scias eligi koloristajn efektojn eblajn nur al bona konanto de pianinstrumento, li enkondukas tre kuraĝajn harmoniturnojn, uzas atentigajn disonancojn, eligas majstre hororon dissemantajn efektojn. Apud la simpleco de temoj rimarkiĝas riĉeco de fantazio, estra uzado de celsciaj rimedoj, eligantaj harmonian agordiĝon, poezia kaj drameca esprimo de enfundaj

sentoj, jen diatona melodilinio, jen ĥromatika kolorigo, jen klasika, jen novtempa karaktero: ĉio ĉi montras riĉan individuecon. Li suriris vojon tretitan de Chopin kaj marŝis ĝin laŭ propra emocio por penetri al la fonto de eterna belo.

Sed ne nura virtuozececo, kiun vidis en li precipe la eksterlandanoj, sed interna, spirita profundeco radianta el la persono de majstro formas lian individuon. La franco Saint-Saëns eldiris pri Paderewski: „Li estas geniulo ludanta ĉe tio pianon“ kaj tio iĝis ne nur spritaĵo, sed reala vero, se ni konsideras, ke Paderewski — kie ajn li koncertas — eligas neesprimeblan entuziasmon en ĉies koro. Tio ne povas alie okazi, nur se ni kredas, ke ekster nia mondo ekzistas spiritaĵoj, kiuj de tempo al tempo enkorpiĝas laŭ Dia volo kaj estas refleksoj de Plej Alta Spirito kaj Harmonio. Tiaj unktituloj (? Red.), ne sentante kontenton pro la tertempa vivo sopiras al eterna Bono kaj penas levi kun si ankaŭ la homaron al pli superaj altaĵoj. Hodiaŭ la koncertoj de Paderewski estas ne virtuoza parado aŭ vetkurado je efektoj kaj sukcesoj, sed piece preparita muzika diservo de animo, serĉanta ŝtupon post ŝtupo al la Fonto de Eterna Saĝo kaj

Feliĉo.

Wejherowo en septembro 1935.

Józef Orzech.

## KAZIMIERZ BRODZIŃSKI (1791-1835).

Brodziński, la antaŭiranto kaj unua kodofaristo de romantika tendenco en Polujo naskiĝis en la vilaĝo Królówka ĉe Bochnia la 8-an de marto 1791 kiel filo de bi'administranto, Jacek Brodziński. En kvina vivjaro li spertis la unuan perdon: lia patrino mortis, kio kun ĉiuj akompanetalajoj enpenetris en lian animon. Ĝisfunde kortuŝita kaj ekskuita per tiu unua sortbato, li preĝis poste al sia patrino kiel al sanktulino kaj tute enlarmiĝinta skribis ĉe luna lumo elegion al la ombroj de patrino — laŭde ĉiam menciitan de lia frato, Andreo.

Venis poste duonpatrino kaj Brodziński vivis la sorton de orfo, pri kiu neniu zorgis preter maljuna servistino, kiu satigis lian animon per rakontoj pri la patrino. Evitante la duonpatrinon kaj lasita al si mem travivis Brodziński la infanjarojn kun la samaĝuloj, kun la naturo.

La unuan instruon li ĉerpis en vilaĝa lernejo en Lipnica. La lernejestro, fran-

camode pudrita, kun longa harplektaĵo kaj bukloj, opiniis la betulan vergon plej taŭga instruilo, kies uzo estis senĝene demonstrata sur la dorso de gelernantoj. Kvar jaroj de tia instruado alproprigis al la lernanto nur ioman konon de skribado kaj legado en pola kaj germana lingvoj.

Kiel naŭjara knabo transiris Brodziński en la elementan lernejon en la urbo Tarnów por tri jaroj, poste en tiean 5-klasan gimnazion. La okupacia aŭŝtria lernejo ne zorgis tro pri la instruo aŭ eduko. Ĉio preter la religio estis instruita en lingvo germana, nekonata kaj nekomprenata de la malgrandulo kaj konsistis ĉefe el parkera lernado de frazoj nekomprenataj. Sen klarigo, sen prelego oni ordonis lerni de tie ĉi ĝis tie, la nesukcesinta ricevis vipobaton. Estis do turmentata la memorpovo kaj ne disvolvata la intelekto. Nature la germanaj lernejoj superis la polajn, komprenante, kion ili lernas.

En la gimnazio oni instruis precipe latinan lingvon laŭ lernolibro de Alvar, akomodita al lingvo germana — kaj ne al pola. Post tri jaroj de tia instruo transiris Brodziński en gimnazion en Kraków por unu jaro, sed, perdinte poste la patron, li revenis en la vilaĝon al la duonpatrino, kie trafolumante la paperojn kaj librojn, postlasitajn de la patro, Brodziński la unuan fojon konantiĝis pri poezio, kio vekis en li la internan puŝon, la bezonon de sinesprimo ankaŭ en versoj. Li kantis do pri sia patrino (de si nekonata), imitis la popolajn konojn pri simpla kaj sincera amo.

Lia frato, Andreo, venis el Lvova universitato al la onklo, kiu estis paroĥo en Wojnicz (Vojniĉ), urbeto ĉe rapidflua kaj danĝera rivero Dunajec kaj skribis al Kazimiro multe pri la poezio, pri siaj tradukoj. Tio entuziasmigis Kazimiron eĉ pli por la poezio, li sendis al la frato siajn poeziajn primitivaĵojn, fine li forveturis al la onklo, kie li travivis plej feliĉan epizodon, legante kun la familianoj idiliajn poemojn de Gesner, skribante siajn poeziprovojn. Vivante en la atmosfero de imagata, ideala realeco de gesneraj poemoj iĝis Brodziński tre timema, homevitema.

Post la epizodo en Wojnicz revenis Brodziński en la gimnazion en Tarnów. La lernado estis tamen nur senpensa parkerado de reguloj pri latina sintakso, retoriko kaj poetiko. Pli grandan inteteson, ol tiuj reguloj, vekis en Brodziński la legado de latinaj aŭtoroj. Profesoro Schmidt (Ŝmit) divenis en li la talenton kaj instigis al laboro pri poezio, pruntis al li la poeziaĵojn de Utz, Kleist, Hagedorn, Goethe kaj Wieland. Brodziński eluzis ilin al tradukado en polan lingvon, kio tamen ne plaĉis al la profesoro, ne estimanta la lingvon de „pereanta“ laŭ ĝi popolo.

Ĉiam mankis al fervora junulo libroj polaj, kiuj povus esti modelo kaj montrilo sur la vojo, kiun li intucie nur divenis. La libroj kun grandaj malhelpoj, menditaj el Kraków estis al li konfiskitaj de nekomprenebla lernejprefekto, ĉar ĉiu pola libro estis tiam kondamnita el la lernejo. La interna puŝo al poezio ne silentiĝis, sed serĉis esprimopovon en versetoj, kiujn lia frato Andreo aperigis poste en unu volumo kun siaj versaĵoj.

Estis tiam la tempo de pli vigla nacia movado pro revivigo de ioma parto de dispartigita Polujo en la formo de t. n. „Varŝava Duklando“, kiu prezentis sin al la junaj fantaziuloj kiel pa-

radizo, tero de miraĵoj, kaj ili ofte malaperadis por envicigi sin en la polan armeon. Kvankam malforta kaj malsanema iris ankaŭ Brodziński la saman vojon, alvenis Krakovon kaj partoprenis la ekspedicion kontraŭ Moskvo (1812), la batalojn ĉe Smoleńsk, Moĵajsk, ĉe Leipzig, kie vundite li enfalis en prusan malliberon.

Liberlasita en la j. 1814 forvojaĝis Brodziński Varŝavon, kie li ricevis oficon ĉe la Kleriga Komisiono kaj plenumis ĝin ĝis 1820. Dume li estis honora sekretario de nacia teatro, kies tasko estis la literaturista cenzurado de teatraĵoj kaj apud tio li preparis sin por la instruista fako kaj donis lecionojn en la Instituto de Piaristoj en Żoliborz.

En la j. 1821 ricevis Brodziński la postenon de profesoro en la varŝava liceo kaj en la universitato. Depost la j. 1819 li estis ankaŭ redaktoro de la ĵurnalo: „Pamiętnik Warszawski“ (Varŝava Revuo). Tiamaniere Brodziński surstampis sian influon en la literaturistaj rondoj kaj gajnis ĉie estimon.

Troŝargita per diversaj laboroj por savi sian sanon forveturis Brodziński en 1824 en Italujon tra Praha kaj post mallonga restado sub itala ĉielo li submetis sin al la kuracado en Karlsbad, vizitis Svisujon, Parizon kaj, reveninte Varŝavon 1826, li edziĝis al Viktorio Holly.

La novembra insurekcio 1830 j. entuziasmigis lin. Sed ne povante pro detruita sano partopreni ĝin aktive li helpis laŭ siaj fortoj en la ĉefurbo. Post la malsukcesinta insurekcio la universitato estis fermata kaj Brodziński devis serĉi novan okupon por sin vivteni. Pli enfunde faris al li doloron la malbonfarto de la lando. Li multe malgajiĝis, soleciĝis, denove malsaniĝis kaj serĉis helpon en Karlsbad 1835, de kie li jam ne revenis plu en la landon, li mortis nome en Dresdeno en oktobro 1835.

Brodziński postlasis negrandajn originalajn versaĵojn de diversa enhavo, skribitajn komence laŭ klasika gusto (elegiojn, fablojn, odojn), kaj poste laŭ maniero de popolaj kantoj, pretere unu pli grandan idilion „Wiesław“, nefinitan poemon „La bienestra palaco en Lipiny“, multajn tradukojn de popolaj kantoj serbaj, slovakaj, ĉeĥaj, moravaj, rutenaj, li tradukis ankaŭ verkojn de Schiller, Goethe, Herder. Li montris ankaŭ intereson por popolaj kantoj el la insulo Madagaskar.

Plej flataj estis opinioj pri „Wiesław“, kie Brodziński prezentas la simplan, tran-

kvilan vivon de vilaĝanaj familioj, la simplecon, honestecon, bonkorecon, gajecon de vilaĝa popolo. Tio estis kaŭzo de pli multaj eldonoj de „Wiesław“ kaj de ĝia alĝustigo por teatra prezentado, faranta tre bonan impreson pro sia kolorista flanko, pro sia simpla, trafa, honesta vivo-filozofio.

Seweryn Goszczyński entuziasme karakterizas „Wiesław“-on kiel „aŭroro malvualanta al pola nacio tiun parton de ĉielo, el kie estas surironta la suno de vera poezio“.

Por tiamaĵ tempoj tio estis granda novaĵo, paŝo decida, tiel fruktodona por la tuta grupo de poetoj romantikistaj.

Preter la agado sur la poezia kampo estis Brodziński aktiva kaj produktanta en la fako de literaturkritiko. Tre valoraj estis liaj disertacioj: „Pri klasikismo kaj romantismo“, „Pri elegio“, „Pri

ekzalteco kaj entuziasmo“, „Pri metrika taŭgo de pola lingvo“, „Rimarkoj pri la spirito de pola poezio“, „Leteroj pri pola literaturo“, „Pri la sonetoj de Mickiewicz“ kaj multaj aliaj.

En siaj estetikaj eldiroj kliniĝas Brodziński al la tezoj de estetikistoj germanaj; sed lia ĉefa merito estas, ke li montris al la poetoj romankitistaj la veran fonton de inspiro, enhavantan la karakteron nacia, hejman, malfremdan, konkordan kun nacia spirito kaj tradicio: la popolan poezion, kutimon, kredon, vivon.

Tio estas lia ĉefa merito kaj signifo de kritikisto kaj estetikisto. Lia agado multe kontribuis al la preparo de nova turno en la literaturo, kiu ekbrilis en la unuaj volumoj de Adam Mickiewicz.

**Józef Orzech.**

## SKOLTA ANGULO.

### KARAJ FRATOJ KAJ VI ĈIUJ!

Rezulte de la XIII-a Internacia Esp. Skolta Konferenco, okazinta en Spała (11—25. VII. 1935.), Gvidantaro de la Konferenco prezentis la raporton kaj rezoluciojn al la Ĉefkomandejo de Pola Skolta Asocio (Warszawa), kaj al Internacia Skolta Komisararo — H. Kapiszewski (Katowice). Nune skoltfrato St. Dziwlik (Kraków) estas oficiale rajtigita de Z.H.P. (esperante P.S.A.) organizi Pollandan Distrikton de la Skolta Esp. Ligo en la kadroj de Pola Skolta Asocio (Z.H.P.). Ĉiuj geskoltoj de nun turnu sin pri la organizaj aferoj al suba adreso kaj postulu precizajn informojn. En lokoj, kie troviĝos grupeto da skoltoj emaj lerni esperanton, ni laŭeble destinis al ili esp. instruiston. Alsendu al ni viajn adresojn. Pro tio

ni treege petas ĉiujn gesamideanojn laŭeble helpi nin en la laboro. Kursestroj estas speciale invitataj al kunlaboro en ĉiuj lokoj, kie troviĝas skoltaj rondoj.

**Dankon!**

Organizantaro de la XIII-a Tendaro, dankas ĉiujn, kiuj iamaniere helpis nin en la aranĝlaboro. Dankon al landa kaj eksterlanda gazetaroj pro iliaj favoraj reportaĵoj.

**Sukceso!**

Ni ĝojas sciigi ĉiujn legantojn de P.E., ke dank' al favoro de la redakcio de P.E. ni povos ĉiunumere anonci sciigojn de la skolta esp. movado en la rubriko „Skolta Angulo“.

SKOLTA ESP. SEKRETARIEJO: —  
KRAKÓW, LELEWELA 9 m. 2.

## RENKONTO!

Bruis la urbo. Aŭtomobiloj rapide kuras unu post la alia. Seninterrompe fluis torento de piedmarŝantoj. Sur ĝizaj muroj de domoj fantazie eklumiĝadis diverskoloraj neonreklamoj. Jam krepuskiĝis.

Subite ĉe la stratkruciĝo mi renkontis ŝin, la princinon de miaj revoj, ŝin, al

kiu mi tiel ofte sopiris kaj kiu estis tiel malproksima, indiferenta...

Ŝi kapjesis permesante sin akompani. Ni ekiris tra la aleo borderita de poploj. Mi parolis pri malgravaĵoj, arde pledis por bagatelaĵoj, defendis kaj atakis... Sed la koro batis pli ofte kaj ĝi volis nepre

sin enmiksi en la, ŝajne, supraĵan babiladon.

Estis jam vespero. Steloj juvelumis la lazuran ĉielon kaj susuris pintoj de la poploj, movataj de milda venteto. En la aleo, flanke de la ĉefstratoj, estis senbrue kaj trankvile. Ni iris unu apud la alia kaj de tempo al tempo, hazarde, niaj brakoj apenaŭ kunpuŝiĝis. Tiam iu stranga emocio regis min kaj mi deziris, ke tiu ĉi momenteto daŭru eternecon. Ĉe la alta domo kun kolonoj ŝi subite haltis.

KAROL MICHAŁEK, JASŁO.

## „MAGIISTO“

(Rakonto de iu urbestro).

Antaŭ tridek jaroj montriĝis en nia urbeto tre granda afiŝo: „Sinjoroj kaj Sinjorinoj!“.

Atentu, Atentu: glora en Eŭropo kaj Ameriko magiisto kaj telepatiisto Ernesto Volpini prezentados post mallonga tempo en restoracio sub „Ora Koko“.

Ĉiuj literoj de la afiŝo estis grandaj, diverskoloraj kaj supre estis pentritaj tre nigraj, misteraj okuloj.

Mi iris en mian domon, meditante pri la magiisto, sed baldaŭ mi forgesis pri lia prezentado kaj telepatio.

Kelkajn tagojn poste mi sidis en mia ĉambro, kaj legis romanon; subite eniris servistino kaj parolis: „Mi pardonpetas sinjoro, gasto venis!“

Baldaŭ eniris ia homo, salutis min, kaj parolis mallaŭte: „Bonan vesperon sinjoro urbestro, mi estas Ernesto Volpini, magiisto“. Mi rigardis atente al li: li estis alta kaj maldika; lia vesto estis nigra; en mano li tenis ĉapelon kaj bastonon. „Kion vi volas?“ mi demandis. „Sinjoro“ — li respondis — mi venis helpon peti, ĉar vi estas urbestro, kaj persono via estas en urbo plej respektata; en mia prezentado mi divenos la nombrojn; sed mi ne scias, kiel tion fari, kaj pro tio mi petas vin al mi helpi:

Ni priparolos tie ĉi, kaj vi, sinjoro, dum la prezentado parolos ekzemple nombron 1939, kaj mi divenos ĝin“.

„Ho! sinjoro, respondis mi, mi ne povas tion fari; ĝi ne estus honore“.

„Ah! sinjoro, urbestro, kion mi faros: mi havas en mia hejmo edzinon, kaj kvar infanojn, sed mi, kaj mia familio devas vivi“. Mi ekstaris; jes, tiu ĉi homo devas vivi, mi komprenis tion tre bone. „Fine, konsento, sinjoro magiisto, sed nia interparolo restu sekreto!“

— „Mi estas ĉe la celo“ — ŝi diris, adiaŭe donante al mi sian manon. Mi prenis ĝin, kaj arde, pasie mi kisis tiun ĉi longan, belan manon. Sur ŝiaj lipoj ekludis subtila rideto kaj apenaŭ aŭdeble ŝi ekflustris:

— „Telefonu al mi?“

Ŝi foriris.

Sed... sed..., ĉu ŝi tion vere diris aŭ nur ekŝajnis al mi?...

L. Dratwer.

„Mi tre dankas, sinjoro urbestro“ respondis Volpini „mi estas tre feliĉa, ke vi al mi helpos, kaj mia familio havos panon“.

Estis vespero. La restoracio sub „Ora Koko“ estis hele lumigita, kaj multaj homoj ĉirkaŭis ĝin. Ĝi estis ĝuste budo, en kiu staris kelke da tabloj, dekelke da seĝoj, kaj malpura bufedo. En ĉambrego de la restoracio staris dikventra restoraciisto, kiu havis ankaŭ malpuran veston.

En angulo de la ĉambro troviĝis granda podio, per kurteno kovrita.

En restoracio estis jam multaj rigardantoj, kiuj min afable salutis.

Mi sidis sur la seĝo, apud mia tableto, kaj atendis prezentadon. Post momento kurteno forŝoviĝis, kaj sur la podio aperis sinjoro Volpini; li havis nigran, malnovan frakon, kaj sur la kapo blankan turbanon. La magiisto salutis siajn gastojn, kaj komencis multajn artifaĵojn fari.

Rigardantoj tamen ne estis kontentaj; tial li finis, parolante: „Sinjoroj, nun mi divenos la nombrojn, kaj skribos ilin sur la tabulo“ (la malgranda tabulo, kaj seĝo staris sur la podio). „Mi forlasos ĉambregon, kaj unu el sinjoroj, ekzemple sinjoro urbestro, parolos laŭvolan nombron; post momento mi revenos kaj la nombron divenos“.

Tiam li riverencis kaj la restoracion forlasis.

Mi ekstaris, kaj parolis: „Sinjoroj! magiisto parolu ekzemple nombron... 1939. Ĉu bone?“

„Jes, jes sinjoro urbestro tre, tre bone“, kriis la gastoj, En tiu ĉi momento aperis Volpini longe rigardis al la gastoj, dignoplene prenis kreton kaj skri-

bis: 1, 9, 3, kaj fine 9. La rigardantoj estis tre kontentaj kaj manfrapis. Subite ekstaris mastro de la restoracio kaj kriis: „Bone, bone sinjoroj, fidu al li, sed mi ne kredas, ke li scias nombrojn diveni; forlasu, sinjoro magiisto, la cambregon, kaj nun mi diros la nombron!“ Volpini paliĝis, sed fine forlasis silente la podion. Tiam ekkriis la mastro pli laŭte: „li skribu nombron 1 2 3 4! En tiu ĉi momento estis al mi tre malbone, mi komprenis, ke Volpini ne divenos la nombron, kaj mia honoro estos makulita, kaj ĉiuj vidos, ke „magiisto kaj telepatiisto Ernesto Volpini“ estas ordinara trompanto. Post momento revenis Volpini, mistere rigardis al publiko, kaj skribis 1 2 3 4!

HENRYK SIENKIEWICZ.

## FIERECO.

(Humoraĵo).

Unufoje sinjorino N., agrabla kaj estiminda maljunulino, rakontis en sufiĉe granda societo de junaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj sekvan anekdoton:

„Fiereco estas eraro sufiĉe ĉe ni ordinara. Ĉe viroj tro akrajn de ĝi randojn malakrigas la vivo mem, sed virinoj ne povas ĝin longe forigi kaj iĝas pro ĝi netolereblaj. Etas stranga ankaŭ tio, ke per fiereco distingiĝas tiuj ofte personoj, kiuj havas nenian kaŭzon por tio. Tia estis ankaŭ mi. Mi estis tre „fiera“ infano.

Dum kuro de jaroj tiu eraro evoluis en mi ĉiam pli. En knabina edukejo mia fiero konduto malfavorigadis por mi koleginojn, poste, en salonoj, kamaradinojn kaj junularon. Oni ne ŝatis min kaj nomis „reĝidino“, sed tio ĝuste tiam flatis al mia egoismo kaj pligrandigis plu mian fierecon.

Pro tio neniuj juna viro alproksimiĝis al mi kaj mi estus sendube maljuna fraŭlino, se ne tio, ke mi iĝis subite por ĉiam de mia eraro kuracita. Ĝi estis antaŭ pekkonfeso paska. Dum kalkulado de la pekoj venis al mi en penson demando, ĉu mia fiereco ne apartenas al pekoj ĉefaj.

Alirinte do al konfesejo, en kiu sidis ne mia konstanta konfesprenanto, sed iu tre maljuna jam pastro, mi konfesis fine post diversaj pekoj, ke mi estas fierega. Sed la maljunulo eble precize ne ekaŭdis, ĉar li ĉirkaŭis per manplato orelon kaj demandis.

„Kia vi estas“.

„Fiera“ mi respondis, ne sen sento de

Ĉiuj rigardantoj kriis: „brave! brave“ kaj tre laŭte manfrapis. Kaj mi ekspiris!

Mi sidis apud skribotablo en mia domo, kiam eniris servistino kaj parolis: Mi pardonpetas, sinjoro, gasto venis. En tiu ĉi momento aperis sinjoro Ernesto Volpini: li riverencis kaj parolis: „Sinjoro urbestro, mi tre, tre dankas, ke vi al mi helpis“.

„Ah, sinjoro! Kial mensogis vi, ke vi ne scias la nombrojn diveni“, kriis mi indigninte. „Mi, mi, sinjoro, nun ankaŭ ne scias, kiel tion fari“, respondis li tre mirigite.

„Kaj la nombro de la restoraciisto?“ Ha! Ha! Ha! sinjoro urbestro, mi priparolis ankaŭ kun li.

interna fiereco, ĉar ŝajnis al mi, ke ne ĉiu povas havi tian pekon.

„Aha! fiero! Nu, mi petas! Kial vi, mia infano, estas tiel fiero?“

Mi silentis, ĉar mi ne povis trovi respondon.

„Ĉu vi eble devenas el ia historia familio?“

„Ne, tute ne! Jen, mi estas nobelino, kiel ĉiu alia, sed mia familio tute ne estas historia“.

„Aha! vi estas eble tre talenta, aŭ instruita?“

„Ne, artistino mi ne estas kaj instruita ankaŭ ne, ĉar mi finis knabinan edukejon, sed nun onklinjo enkondukis min en societan vivon, kaŭze de tio mi ne tre havas tempon, ion legi“.

„Nu, mi scias jam: vi certe estas tre riĉa?“

„Ne, patro. Paĉjo havas vilaĝeton, sed ankaŭ iom da ŝuldoj, kaj onklinjo vivas el pensio post edzo“.

„Kio fine? Ĉar min tio ne interesas kaj ne bone vidas, sed, se nek tio, nek alia — supozeble vi devas esti belega?“

„Malbela eble mi ne estas, sed al beleco multe al mi mankas“.

„Aha!“ diris ree pastro.

Kaj post momento al mi:

„Nu, trankviliĝu, mia infano, ĉar vi estas stulta, ne fiero, kaj tio estas neniam peko“.

Kaj jen per tia procedo forlasis min por ĉiam mia fiereco“.

Traduko de Ignaco Regio  
(Jasło)

JAKOBO EPSTEJN (Lida).

## ĈIELEN KAJ SURTERE...

Mi staras en la strato inter centoj — miloj da homoj kaj, kiel aliaj, rigardas la diable ĉirkaŭflugantajn aeroplanojn: grandaj ŝipoj transformiĝas je etaj birdetoj, je muŝoj, je kuloj profundaĵe de l' aero kaj denove aperadas grandaj bruegantaj monstroj, malsupreniĝantaj teren, kvazaŭ pezaj ŝtonoj falegantaj de l' ĉielo dum terura hajlego. Antaŭ la fratoj **Montgolfier** la homaro ne imagis, eĉ ne songis pri tiugrada progreso de natur-almilito, de naturfortoj-venko.

Sekve, ni jam flugas ĉielen kvazaŭ birdoj, ni jam „birdiĝis“! La homo povas vere fieriĝi pro sia genieco. Sed kiam ni ekanalizos la tutan aferon, nia fiereco kaj bonhumoro malaperos kaj ni kortremos... Bedaŭrinde, ĉia progres-detalaĵo de nia prudento estas uzata ne por la bono de homo, sed por lia malbono. La teknikarto mem estas tre bona, utila, eĉ feliĉa akiraĵo por ni, sed ni kulpas, uzante niajn progresiĝojn en kontraŭa flanko. Ĉu ĝi ne povas servi pruvon, ke la homo estas besto? — „Homo homini lupus est“.

Ni ĉiuj ankoraŭ memoras la diron de formortinta grafo **Cepelin** antaŭ mul'aj jaroj: „Mi ne intencas per mia elpenaĵo alporti bonon al homaro ĝenerale, sed mi zorgas sole mian patrujon“ (t. e. por militvenki, por mortigi homojn...).

La moderna kemio fieriĝas pri tio, ke ĝi kapablas ekstermi la tutan Parizon, ekz.: mortosufokante per venengasoj milionojn da vivoj dum unu duonhoron...

Kortreme ni memoras pri la pertorpeda dronigo de „Lusitania“ kune kun ĉirkaŭ mil homoj pacaj (dum mondmilito, 1915 j.), kaj la ĝojego, elvokita tiuokaze en la tendaro de triumfintoj...

Ni ekmemoras: kiam La-o-ĵan (Mandjuro) estis forbruligita meznokte de Japanoj (1904 j. dum rusa-japana milito) kune kun miloj da homaj viktimoj, la rusaj gazettelegramoj titolis la komunikajon: „Belega spektaklo!“ (ruse: Velikolepnoje Zrelišĉe!). Ĉu ne estas vere, sinjoroj? **Belega spektaklo!...**

Sed ĉu estas eble elkalkuli ĉiujn kruelaĵojn, kiujn la moderna miraklofaranta kemio okazigis? Jen ni legas pri nova speco de paflego, de japanoj kreita, kiu povos elpafi naŭmil kuglojn dum unu minuto...

Similaj sovaĝaĵoj ja devojigis plurajn pensulojn, abomenigis al ili la progreson, civilizadon, la teknikon kaj hom-

cerbumajn eltrovojn entute, kvankam ili **sence** malpravas. Ja siatempe famekonita rusa aviadisto **Jefimov** intencis foje viziti Leonon Tolstoj'n en lia bieno „Jasnaja Polana“ per aeroplano. Sed Tolstoj, volante esprimi sian proteston kaj kontraŭstaron al la eŭropa kulturo, petis la aviadiston, ke li prefere veturu al li **ĉevale...**

Sed ni konsideras la kontraŭstarecon de similaj eminentuloj kiel **eraron**. La tekniko ne estas kulpa, se en manoj de homo ĝi aliformiĝis je mortigilo. Ni povas per tiu sama kudrilo kudri vestojn kaj trapiki korpon; per la sama tranĉilo tranĉi panon kaj buĉi homon. Hakilo ne estas kulpa, se ni **faras** ĝin ilo por frakasi kraniojn...

La tasko kaj misio de l' civilizita, antaŭenpaŝema homaro estas: reguli la kapricojn de l' naturo por la bono de l' vivo. Similan kunvivon ni vere imagas por la, bedaŭrinde, ankoraŭ malproksima estonteco.

Kiu do efektive kulpas je tiu ĉi situacio? Kulpas, grandmezure, la **grandpotencoj** de l' mondo. Ĉiu nacio, samkiel la individuo, havas nerefuteblan rajton por sin defendi. La reliberiĝintaj nacioj, restarigitaj, post la mondmilito (1914—1918) reviviĝintaj, volas **pace vivi**; sed la grandpotencoj maltrankviligas ilin per siaj nesatigeblo, interkonkurado kaj avideco al novaj kaptajoj-aneksoj... Alidire, la grandaj eŭropaj regnoj **devigas** la renovigitajn popolojn armiĝi. La devigita armiĝo, la kreado de grandegaj armeoj, t. e. la „sindefendo“, englutas pliparton da naciaj budĝetoj. De tio okazas la popola malriĉeco.

Kiam do alvenos la tempo, ke la homaro ĉesos malbonuzi sian progreson? — Tiuj, kiuj ĝuas la tondradon de kanonoj, eksplodojn de ŝrapneloj, bombjetadon el aeroplanoj, torentan verŝadon de varma homsango; — kiuj ŝatas aŭdi la ĝemkriojn de vunditoj, stertoradon de mortantoj, ploregojn de milionoj da vidvinoj kaj georfoj; tiuj, kiuj amas rigardi ruinigon de urboj, tutaj regionoj kun ĉefverkoj de scienco kaj arto; — poste, kiel ne evitebla sekvo de tio ĉi, komunehoman malsategon, epidemiojn, kaj fine: la **moralan brutiĝon** de l' homoj — similaj homoj estu ĝajaj kaj ĝojplenaĵ! Ni malenvias ilin! Tiuj, kiuj estas kontentigitaj pri simila „bonordo“ de l' mondo, ĝuu la dolĉecon de tia vivo! Sed



aliaj, la plejmulto de l' homaro, ne kontentas — kaj atendas pli bonan tempon...

Kiam do ekaperos la vera Pastro de l' Paco kaj faros pri tiela teknikarto -

uzado funebrau diservon?

Jes, ni flugas ĉielen, ne havante bazon surtere....

## LINGVAJ KONSIDEROJ.

Utila estas la lingvo — kaj langoskermado por ekzerci sin kaj aliajn en korekta lingvouzado kaj klarigi al si la ĝustan lingvokarakteron, stilon aŭ licencon. Ne havante proksime personon esperantlingvan por kuna diskutado, mi provas tion fari, uzante kiel materialon la enhavon de 8—9 numero de P. E. Mi permesas nome al mi subigi kelkajn diritaĵojn(—ili estas pli ĝuste: skribitaĵoj—) al eksperimenta esploro. Jen serio da ili:

1) Post kelkaj radioprelegoj avertis nin s-o Dreher pri esp-aj sonoj neagrabla de laikaj oreloj akceptataj, kiel: kiu — tiu. Por eviti tion ni ŝanĝu la relativan formon en partcipe-substantivan aŭ partcipe-adverban, ekz.: „kiu esploras... tiu povas vidi“ — partcipe: La esploranto... povas vidi, aŭ: Esplorante... oni povas vidi. Avantaĝa estas tiamaniere la fraza koncizeco.

2) „Antaŭmilita esp-isto varbiĝadis... el la homoj“ — mi preferas: „Antaŭmilite la esp-isto estis varbata... el inter la homoj“. (La „—iĝi—problemo“ postulas apartan, pli longan konsideron).

3) ili estis entuziasmigitaj „pri la donaco“ — eble pli korekte: per, pro, dank' al....

4) „ĉiu nove kaptita adepto“ — oni ja ne kaptis la adeptojn por ilin kapteni, sed kaptante iun oni volis gajni lin por la ideo, do mi diras: „ĉiu kaptgajnita“.

5) „kiam... post la VIII Univ. E. Kongreso ideo... disvastiĝis... kaj tial la societo komencis perdi sian vivemecon“ — la frazo ne estas al mi sufiĉe klara, eble la aŭtoro intencis diri: „kiam... post la... kongreso la ideo... disvastiĝis... kaj ĵus tiam (malgraŭ tio)...“

6) „antaŭvideble devis ja la societo pligrandiĝi kaj tamen malgrandiĝis“ — oni ne povis antaŭvidi la pligrandiĝon (—kiu tion faris, trompiĝis—), sed povis tion esperi, deziri, do: „Laŭatende, laŭespere devis... pligrandiĝi kaj tamen malgrandiĝis“.

7) „Subtorperdiĝi“ — ĉu: igi subtorpedo? eble: torpedtrafi, torpedbati, detru, rompi, frakasi?

8) „Nova periodo estis... ŝanĝita“. La nova periodo estas tempospaco, kiu venas, do ĝi ne povas esti ŝanĝita, se ĝi

ne ekzistis; ŝanĝita tamen povis esti la situacio, pozicio, la akompanaĵoj, kondiĉoj, cirkonstancoj.

9) „La vojo estis elhakita“ ŝajnas esti polonismo; ĉu ne: hakpreparita, krudpreparita?

10) „En la interrilato kun“ — tia esprimo levas la „interrilaton“ en substantiva formo al la rango de tre grava, signifa frazoparto; se en nia penso ŝvebas la ideo adverba, ni diru: Interrilate kun, Pro la... jubileo, Rigardante la jubileon, Rilate al, Konsiderante.

11) „vana iluzio“ estas pleonasmo. Se la iluzio ne estus vana, ĝi ne estus iluzio.

12) „dividita en kvartalojn-tendojn“ — ĉu ne: „en tendarkvartalojn aŭ kvartalojn?“

13) la polico haltigas eble per la vorto: „enirpermeson!“ — kompletigata enpense per la aldono: „mi petas montri“ kaj ne: „enirpermeso!“).

14) „la publiko devas atenti la regularon“ — eble: respekti, observi, obei.

15) „aŭ iri en la tendaron en la vizithoroj“ — pli ĝuste: „eniri la tendaron dum“.

16) „Unue iris al la skoltinoj, mi volis unue vidi“ pli precize: „Mi min turnis“ kaj poste oni devas eviti la tujan ripeton de sama vorto: unue.

17) La skoltinoj estos eble malagrabla surprizitaj pro la rango de „policistinoj“; ili designas el inter si la deĵorantinojn, tagskoltinojn, pretistinojn, pretgardistaron.

18) „ĉio estas ŝanĝenda“ estas tro pretendema anstataŭ sole taŭga: „ŝanĝebla“. La senco enestas: oni povas ĉion ŝanĝi — kaj ne: oni devas ŝanĝi. Cetere tiu gerundiva formo ne sukcesis ankoraŭ akiri pli vastan „civitanrajton“ aŭ preferon.

19) la 8- kaj 10-jaruloj ne estas ja etuloj! (For la „ofendo“!)

20) oni diras „vetkuri“, se oni efektive kuras; se oni penas superi la konkuranton, ni diras: konkurenci, konkuri, vetlabori, rivalizi.

21) „varo“ estas uzata en granda komerco; ĉe skolta interŝanĝo sufiĉos: „peco por peco, aĵo por aĵo, io por io“.

22) „La lingva esploro“ ne aprobante la esprimon: „kio devigas neniun al nenio kaj nenie“ pro kelkaj neoj, ne donas tamen al la erarinto konsilon, kvankam la esprimo ne apartenas al tute simplaj. Ni provu helpi: „kio devigas neniun al io ajn kaj ie ajn“ — ŝajnas tro peza. „Kio al nenio kaj nenie iun ajn devigos“ — iom pli bona. „Kio nenie devigos iun al io ajn“ eble plej trafte, se supoze la citita frazo ne konsistas el tri frazeroj: *kio devigos neniun, (devigos) al nenio kaj (devigos) nenie.*

23) „ne multe estas fareblá“ — aprobinda estas nur substantiva formo: „ne multo estas farebla“, ĉar la subjekto devas esti nepre substantivo (do: substantiva formo, alie mankas la subjekto) aŭ anstataŭanta ĝin pronomo, sed ne la adverbo, kiu tamen estas uzebla kiel komplemento ĉe infinitivo: „ne estas eble multe fari, akiri, gajni, sukcesi“.

24) „ĉe akompano de pianistino“ — pli ĝuste: ludakompanata, —ate de, laŭ pianakompano de.

25) „pro presararo“ aludas preterire, ke tiu preseraro estis kvazaŭ intencita, gravsignifa; se tio okazis senintence, ni uzu: „preserare“. Substantivo enhavas pli da pezo, valoro, ol adverbo.

26) por pola esprimo: „porwać“ pli forta kaj preciza estas: „kapttiri“, ol entiri.

27) „atendsopiri“. Estas konate, ke du verbradikoj faras kiel kunmetaĵoj bonan impreson kaj prezentas novajn nuancojn, kion mi menciis en la antaŭvorto de „Vortara aldono“. Ĉu „atendsopiri“ estas vere monstra kreaĵo? Por mi ne. Ni pri taksas ja la vorton ne laŭ ĝia aspekto (porokula aŭ pororela), do ne laŭ ĝia monstreco aŭ malmonstreco, sed laŭ ĝia servo, taŭgo, senco, destino, valoro kaj

laŭ grado de utilo, uzebleco kaj bezono. Se estus uzita: „sopiratendi“, la afero estus eble restinta ekster riproĉo. Kaj tamen tre bone uzebla estas ankaŭ „atendsopiri“ malgraŭ tri konsonantoj. Estas vero, ke esp-aj silaboj plej ofte konsistas el unu vokalo kaj unu konsonanto laŭ latina kaj itala lingvoj, sed tio ne estas kanono; eĉ pli: se en la kunmetaĵoj renkontas sin kelkaj konsonantoj — facile tolereblaj kaj paroleblaj, — la lingva belsoneco povas nur gajni. Multe pli malfacila estas pro abundo de konsonantoj la germana, pola, franca aŭ angla elparoladoj, kaj tamen la germano senbalbute eligas el la gorgo: „gestern abends“ (preterirante eĉ neglekte la elparolon de vokalo: e, aŭdigante do preskaŭ: „abnds“, aŭ eĉ: „amnds“!). Mi aldonu, ke ĉiu konscia esp-isto ne estos leganta: *atends—opiri*, sed: *atend-sopiri*. (Simile pri la punkto 4 kaj 26 pli supre\*).

28) la frazo: „flamtrempi dommaron en helecon“ estas neklara kaj nekorekta; kiamaniere oni povus „trempi la maron“? Eble: enigi, donigi domojvicon (domaron) en helon, flamon, flamomaron.

Por tiu fojo sufiĉu!  
Wejherowo en septembro 1935.

Józef Orzech.

\*) Eble ne estos senbezone rimarkigi, ke en la pola lingvo estas troveblaj vortoj kun grupoj de **maksimume** 4 konsonantoj, unu post alia prononcataj. Cetero tiaspeca konsonanto-kombinoj estas maloftaj, ekz. *ź d ź b ł o* (dź estas unu konsonanto, sed du literoj), *b e z s k r z y d ł o w y*. En la germana lingvo, ankaŭ en la nederlanda, oni povas trovi grupojn eĉ de 5 konsonantoj, ekz. *Angstschrei*.  
La Red.

Dr. LEOPOLD DREHER.

## LINGVA ESPLORO.

En la maja numero de „Pola Esperantisto“ mi rimarkis sekvantajn eraretojn:

Anst. sur la tuta mondo „mi preferas“: en la tuta mondo. (Sed: „sur la tuta terĝlobo“).

Anst. fiero de la familio, pli bona ŝajnas: **fieraĵo**, ĉar „fiero“ estas pli-malpli: fiereco, dum „fieraĵo“ estas io, pri (pro) kio la familio estas fiera.

„Muzikema talento“ — sufiĉas: **muzika**, ĉar la talento ne emas muzikon, sed estas simple talento de (en) muziko, muziktalento.

Anst. „apud tio“ (przytem), oni pli uzas: **ĉe tio**, krome.

Kreipova — sufiĉas: **krea**.

Inspiriga — sufiĉas: **inspira**.

Ne estas uzata: „plien“, sed **plu(en)**, ĉar „pli“ ne montras lokon, sed kvanton, sekve ne toleras la finaĵon -n.

Jam ofte oni kritikis, eĉ mallaŭdis: nek unu, anst. eĉ **ne** (ne eĉ) **unu**. Oni devas memori, ke „nek“ ne povas stari sola, sed nure akompane de alia „nek“.

Anst. „ombrigita aleo“ pli bona ŝajnas: **ombra aleo**, aŭ: **ombrita aleo**, se oni volas nepre akcenti la „itecon“.

„Ravema ĉarmo“ estas iom malfacile komprenebla. Eble: rava ĉarmo?

„Senpreza silento“? Verŝajne la pola: bezcenny.... Kompreneble devas esti: netaksebla, valorega aŭ sim.

Pri kosmetiko, eble pli bona estas tamen: kosmetikaĵo. Laŭ mi kosmetiko estas abstrakta.

„Mallongdire“ sonas iom tro.... longe. Eble sufiĉas: **mallonge**.

Tiu gloro bazas sin. Pli bona estas: **bazigas, estas bazita**.

„Malfacile estus indiki dimensiojn nur de tiu domo“ estas (Pan Tadeusz) trege malfacile komprenebla esprimo. Eble pli taŭgas: la indikado de la dimensioj jam estus malfacila per si mem, aŭ: la indikado de la dimensioj en si mem estus jam malfacila.

„Tiu koncepto estas traira“, anst. **provizora**.

„La vojo kondukas per pento kaj pentofaro“, ankaŭ bona estus: **tra pento ktp.**

„Ni trovas ĝin en persono de...“ D. e.: ...en la persono de...

„Kie li asignis vojon de...“ Pli ĝuste: **montris, difinis**, ĉar „asigni“ estas faka esprimo komerca, jura k. s.

„Ĝi bazis ne sur...“ anst.: ĝi **bazigis** ne sur.... aŭ: **estis bazita**.

Ĉu „mem-sinjoro“=samowładca? Mi dubas. Oni devus trovi alian, pli esperantecan esprimon. (Noto de l' Red.; oni volis traduki la polan „sobiepan“. Do kiel?).

„La hipertrofiio de l' arbitro“, eble: de l' artitreco, ĉar arbitro ŝajnas signi homon (ekz. arbiter elegantiarum).

„El kiuj eĉ ĉiuj ne estis abonantoj“, anst.: **eĉ ne ĉiuj** estis....

„Filmamanto“ povas esti dusenca: **film-amatoro** kaj **film-amatoro**. Bonvolu fari la diferencon.

„Li nun instruigas je la opera kantisto“, la „la“ estas superflua!

„Rivalizi kun“? Eble: **rivali** al aŭ: **kontraŭ**. „Kurso elementara“? **Elementa!**

## LETERO EL JAPANUJO.

Estimataj Sinjoroj,

Ni havas multe da intereso pri la scienco de via lando, speciale pri la scienco natura kaj matematiko. Ni voias do korespondi kun esperantistoj, sp. kun studentoj de via lando pri matematika kaj fizika temo, sed ĉar ni ne povas trovi ian nomon de tia studento en — LA ADRESARO INTERNACIA —, ni petas ke via societo prezentu al ni kelkajn studentojn, kiuj havas intereson pri matematiko aŭ fiziko teoria kaj eksperimenta.

Ni estas 25—20-jaraj studentoj de branĉo scienca en IMPERIA UNIVERSITATO DE TOKIO, kaj en nia SCIENCA RONDO estas kelkaj studentoj, kiuj povas legi aŭ skribi traktetojn de la angla, franca, germana, hispana, nederlanda kaj rusa lingvo. Ĉu vi ne bonvolus prezenti?

Atendante vian baldaŭan respondon,

Kun antaŭdanko al via afableco.

Kun koraj salutoj

SCIENCA RONDO — Esperantista Grupo  
Scienca Branĉo de TEI-DAI  
Universitato Tokio, Japanujo.



## SPORTO KAJ TURISMO.



### *Impresoj pri ekskurso al insuloj Färöer kaj Islando.*

Jam de multaj jaroj mi havis grandan deziron veturi al tiu lando de ĝejseroj kaj blankaj noktoj kaj fine en somero mi sukcesis veturi tien dank' al bone aranĝita ekskurso per pola ŝipo „Kościuszko“.

Antaŭ ne longe ankoraŭ la vojo al Islando daŭris kelkajn semajnojn, sed nun jam post kvintaga marvojaĝo per nia pola ŝipo ni atingis la islandan marbordon.

Al Islando kondukas la vojo tra la insuloj Färöer. La arĥipelago Färöer konsistas el 25 insuloj kaj nombras 25.000 loĝantojn. Kelkaj insuloj estas kovritaj per herbo kaj eriko, aliaj havas malgrandajn

nudajn rokojn. La ĉefurbo Thorshavn nombras du mil kvincent loĝantojn, ĝi posedas unu lernejon. Oni eldonas tie propran gazeton. Plej riĉaj urbanoj sendas infanojn por studado en Kopenhago, ĉar la insuloj apartenas al Danujo. Sur Färöer oni parolas kaj dane, kaj en propra lingvo, kaj angle, kaj tiuj, kiuj studas en Kopenhago, ankaŭ germane.

Sur Färöer ni vizitis kolorriĉan ĉirkaŭaĵon de la vilaĝo Ĉirĉibeo (Kirkjube) kun karakteriza malnova farmobieno. Oni ne havas imagon, kiel malriĉa estas tiu lando. La loĝantaro okupiĝas per paŝtado de ŝafoj kaj kaptado de fiŝoj. Se oni

kaptas balenon aŭ alian grandan fiŝon, oni dividas ĝin en tiom da partoj, kiom da homoj estas sur insulo. Eĉ infano unutaĝa ricevas sian porcion, kvankam la infano ne manĝas ĝin. La tero sur Färöer re estas fruktodona. Unu familio kun fiero montris al ni rozan arbuston, kiun ili flegis dek tri jarojn kaj en jaro 1934 ĝi ekfloris; ĉie reĝas granda kulturo: ĉie mi vidis radion kaj telefonon. Oni montris al ni malliberejon de antaŭ 400 jaroj, tamen hodiaŭ ne plu estas necesaj malliberejoj.

En Thorshavn ni renkontis unu Polon, kiu rakontis al ni, ke li vojaĝis tra la tuta mondo kaj en Thorshavn li ekkonis iun fraŭlinon, kiu tiel plaĉis al li, ke li edzinigis ŝin kaj nun ili ambaŭ loĝas kelkajn jarojn sur tiu insulo.

Post insuloj Färöer ni vizitis Islandon. Islandon eltrovis iu vikingo Wilgerwarson. Li unua iris norden por detale esplori tiun teron. Li kunprenis tri korvojn. Post kelkaj tagoj, kiam li pensis, ke li estas jam proksime, li ellasis tiujn korvojn. La unua ekflugis al Färöer, la dua revenis al la ŝipo, la tria flugis norden. La vojaĝisto sekvis la trian korvon kaj vere li troviĝis sur insulo. Kiam li ekvidis, ke la insulo havas glacian ĉirkaŭaĵon, li nomis ĝin Eisländ — Islando. Plej stranga specialaĵo en Islando estas la vulkanoj kaj gejseroj, t.e. varmegaj fontoj. Multaj el tiuj vulkanoj jam tute estingiĝis. Al aktivaj oni alkalkulas vulkanon Hekla. En islanda kroniko oni skribas pri 17 erupcioj de Hekla. En jaro 1845 la erupcio de Hekla daŭris sep monatojn, plensŭtante la tutan ĉirkaŭaĵon per cindro kaj superversante ĝin per lafo.

La profundaĵo de islanda tero estas varmega; pravas tion multe da bolantaj erupcioj, kiuj elĵetas varmegan akvon supren, t.n. gejseroj. Unu el la plej grandaj, kiun mi vidis, estas gejsero Grylla, kiu ŝprucegas ĉiu-tri-hore, cetere same, kiel ĉiuj aliaj gejseroj. En la gejsero staras akvo trankvile, kiel en puto, sed antaŭ komenco de ŝprucego el la subteraĵo aŭdiĝas krako kaj brulego. La akvo en funelo komencas bolklaki, kiel dum kuirado. La varma vaporo kun siblo leviĝas supren, poste ŝprucegas subite torrento da varmega akvo kaj pafefluas supren kiel granda fontano. Post mallonga paŭzo sekvas alia ŝpruco, kiu elĵetas akvon ankoraŭ pli alten. La tria ŝpruco leviĝas nur kiel amasigita vaporo; pro tio de malproksime ŝprucintaj gejseroj aspektas kiel fumantaj kampoj. Finiĝis la be-

lega spektaklo kaj la gejsero trankviliĝis por tri horoj.

La akvo, kiun ŝprucigas la gejsero, postlasas surfundaĵon en formo de siliko ĉirkaŭ la gejsera funelo.

Islando nombras 100.000 loĝantojn, kvankam ĝi estas granda tiel, kiel duono de Anglujo. Kaŭzas tion la gejseroj, vulkanoj kaj la klimato. La somero daŭras tie kvar monatojn. En tiu tempo ne estas diferenco inter la tago kaj nokto. Je la noktmezo estas tiel hele, kiel tagmeze; t.n. blankaj noktoj. Dum aliaj monatoj reĝas preskaŭ dum la tuta tago — la nokto.

Ofte dum somero pluvas, estas nebulo kaj ĉirkaŭaĵoj de la suprenleviĝantaj nudaj montoj kaj estingita lafo donas al la pejzaĝo karakterizan monotonecon.

Ni vizitis akvofalon Gullfoss t.n. „ora akvofalo“; ĝi estas konata, kiel la plej bela en la mondo. Mi vidis ankoraŭ mezlernejon en nova domo Laŭgarvatn, kiu estas varmigata ankaŭ dum somero per centra hejtado (ĉar tie estas ĉiam malvarme). La akvo estas ĉerpata de la proksima gejsero. En Islando la homoj plejparte paŝas ŝafojn. Strange aspektas, ke ĉie paŝtas sin ŝafoj sen ŝafisto. Tiuj ŝafoj havas signon de posedanto kaj je la fino de la somero la posedanto ricevas siajn ŝafojn.

Islando estas malriĉa lando. Mi vizitis domon en Islando, kiu estas situita preskaŭ kiel en dezerto, ĉar de unu domo ĝis alia estas kelkaj kilometroj. Oni kondukis nin al ĉambro, kiu havis du ferajn litojn, malgrandan tablon, en angulo staris forno. La ĉambro ne posedis alian mebleton. Oni kondukis nin ankaŭ en malgrandan akceptan ĉambron. La planko estis kovrita per tuko. Estis tie bela malgranda ŝranko, tablo, radio kaj telefono. Ĉu ne estas admirinda tiu grado de kulturo? Mi devas atentigi, ke la ligno estas malfacile ricevebla, ĉar oni alportas ĝin el Norvegujo kaj Ameriko, sed la mebloj estas faritaj en Danujo. Domoj estas konstruataj el ŝtonoj kaj poste kovritaj per musko, t.e. ŝirmo antaŭ la vento.

Al la komunikaj rimedoj apartenas malgrandaj fortaj ĉevaloj „ponny“ de la flava koloro. Rajdas sur ili tiel viroj, kiel virinoj.

Islandaj marbordo kaj najbaraj insuloj havas ejojn kun molanasoj. Sur tiuj insuloj estas multe da nestoj. Molanasoj sternas nestojn dense unu apud alia kaj ne forlasas ilin eĉ, kiam la homo alvenas. Se molanasino forlasas por momento la neston, molanaso okupas la lokon.

Dum la tuta jaro pasigas la molanasoj la tempon sur maro; nur en la tempo, kiam ili metas ovojn, ili transportigas sur kontinenton. Molanasino faras trueton, sternas ĝin per lanugo, kiun ĝi el sia brusto elŝiras. Posedantoj de tiuj insuloj atendas tiun momenton por profiti la momenton de foresto de la molanasinoj, aŭ forpelas ilin el la nestoj kaj konfiskas la lanugon; tiam la molanasino elŝiras la lanugon duan fojon, sed kiam la homoj forprenas denove la lanugon, la molanasino elŝiras la lanugon el brusto de la viranaso. Se la molanasino forlasas por momento la neston kaj ne anstataŭas ĝin la molaraso, tiam la dua molanasino, kiu volas havi pli grandan familion, ŝtelas al najbarinoj ovojn, kiam la molanasino revenas kaj ne trovas ovojn en sia nesto, ŝi ne ĉagreniĝas — atendas nur okazon por ŝteli ovojn. Tial malofte la molanasino kovas proprajn ovojn. Kiam anasideto naskiĝas, posedanto de insulo kunprenas lanugon kaj ideton en la korbon kaj ĵetas ĝin en la maron, kaj tiamaniere plifaciligas la homo al molanaso kunpreni ĝiajn infanojn sur maron.

Ĉefurbo de Islando estas Reykjavik, kie loĝas dudek kvin mil loĝantoj. En Reykjavik estas malgrandaj domoj plejparte unu- kaj du-etaĝaj. La plej gran-

da kaj bela domo estas parlamentejo (t. e. la plej malnova en la mondo). La dua granda domo en Reykjavik estas preĝejo konstruita el lafo. Ĉe la preĝejo estas granda placo herbokovrita, sur kiu staras monumento de Bertelo Thorvaldsen. Thorvaldsen estas konata skulptisto en la tuta mondo ne nur en Islando kaj Danujo. En Kopenhago troviĝas granda kaj bela muzeo de Thorvaldsen. Varŝavo posedas ankaŭ monumenton de Koperniko kaj Poniatowski, verkojn de Thorvaldsen.

La komercistoj komercas kun Eŭropo kaj elveturigas fiŝojn, lanugon, felon. En Reykjavik mi vidis en ekspoziciaj fenestroj nur eŭropajn objektojn, ekzemple saksan porcelanon, vianan konfekcion k. t. p.

En Islando homoj plejparte manĝas fiŝojn. Oni hejtas en fornoj per torfo, ŝafa sterko kaj per fiŝaj defalaĵoj. Plej riĉaj hejtas per karbo kaj uzas centran hejtadon.

Malgraŭ tio, ke la lando estas malriĉa, reĝas ĉie granda civilizo. Ne ekzistas analfabetoj.

Islando havas propran monon kaj parlamenton, sed en Genevo reprezentas ĝin Danujo.

**Olga Goldmanówna (Kraków).**

**LOLA BLANKÓWNA, LWÓW.**

## LA ENERGIA ORGANIZO.

Loko de la okazintaĵoj estas Ameriko, la lando de „senlimaj eblecoj“.

La ĉefdirektoro de la Asekurejo „Vita“, S-ro Johano Dürre, subite deziris ĝui sian liberecon, metante ĉion ĝis nun okazintan en sia laborema vivo „je morta punkto“. Kuraĝe li elprenis el la ĉefa kaso cent mil dolarojn kaj forveturis en la „vastan mondon“.

La suno jam subiris, alproksimiĝis la tempo de la vespermanĝo. Fajfante mondan melodion, li direktis siajn paŝojn al manĝovagono. La servema stevardo metis antaŭ lin la manĝaĵojn kaj nia ĉefdirektoro tre kontente rigardis ĉion. La heroo Johano Dürre estus ankoraŭ pli gaja kaj senzorga, se jenaj faktoj ne ekskuus lian internon.

Jen sur la botelo de la multekosta vino, sur kiu estis algluita papero, troviĝis jenaj vortoj, skribitaj per ruĝa krajono: „Revenu tuj, vi estas observata“.

Johano Dürre sentis vangruĝiĝon. En liar koron, ĝis nun tiel trankvilan, eniris granda timo. Preskaŭ senkonscia li petis glason da akvo, sed lia timo pli grandigis en la momento, kiam li ekvi-

dis algluitan karteton, sur kiu estis skribitaj jenaj malbonon aŭgurantaj vortoj: „Oni dissendis persekutleterojn al ĉiuj stacioj kaj al ĉiuj limoj“.

Johano Dürre estis jam tiel nerva, ke li per tremanta mano disverŝis la kafon. Pro tio li petis la kalkulon kaj li certe estus paginta duoblan kalkulon, se li ne estus vidinta je la subo de la kalkulo jenajn vortojn: „Tiamaniere vi misuzas fremdajn monon kaj fidon“.

Senkuraĝe kaj nerveme li revenis al sia dormovagono, por tie dormante almenaŭ forgesi pri la vampiraj vortoj. Sed ankaŭ tie ĉi li ne havis la deziritan ripozon. Kiam li prenis la martukon, elfalis el ĝi blua karteto kun ruĝaj literoj. „Vi certe volas purigi viajn manojn de kulpo. Vi ne sukcesos. Ni estas je viaj postsignoj“.

Senespere kaj konsternite, S-ro Dürre ĵetis sin sur la liton. Sur la kuseno ekbruetis peco da papero. „Ĉu la homoj, kiuj asekuris sin en via Societo, ankaŭ povas nun pace dormi?“.

Nia malfeliĉa Johano Dürre ne povis ekdormi. Ĉiam li turniĝadis tien-reen sur

sia lito subite li aŭdis jenajn vortojn: „La malliberejo estos por vi pli oportuna restadloko, ol la dormovagono“.

La sekvontan tagon nia Johano Dürre duor. — konscie vivadis. Por iom distri sin li elvagoniĝis ĉe plej proksima stacio. Tie li aĉetis gazeton. Johano Dürre terure ekĉagreniĝis, kiam el la gazeto elfalis karteto. „Aŭskultu niajn bonajn konsilon kaj tralegu purleĝan kodon“.

La eksdirektoro revenis al la vagonaro kaj donis sian biletan al kontrolisto. Sur la dorsa flanko rimarkis la oficisto jenajn vortojn: „Revenu senprokraste. „Tio estas nia lasta admono. Ĉe la plej proksima haltejo atendas vin detektivoj“.

Preskaŭ frenezigita prenis Johano Dürre sian valizon kaj saltis el la rapidvagonaro. Li malsupreniris tre altan deklivon kaj duonmorte atingis la proksiman arbaron. Sed ankaŭ tie ĉi li havis teruran malagrablajon. Jen tie ĉe la rando de la arbaro, staris enigita en la tero, granda tabulo kun jena surskribo. „Kaj tie ĉi vin ankaŭ trovos polico“. Johano Dürre tuj revenis al stacidomo kaj post multe da horoj, preskaŭ mortmalšana, li elvagoniĝis ĉe la Novjorka stacidomo. En sia oficejo, li enmetis la ŝtelprenitajn dolarojn en la ĉefan kason kaj tute trankvile residiĝis ĉe la skribotablo.

## II.

En la granda ĉembrego dissterniĝis brila lumo. Ĉirkaŭ la longa tablo sidis la anoj de la nova instituto por la kontrolo de la asekurejoj. La gvidanto, grizhara maljuna sinjoro alparolis: „Karaj gesinjoroj. Jam en komencaj monatoj de nio Organizo ni povis noti multe da belaj sukcesoj. Depost kelka tempo Usono suferas pro multe da trompoj kaj

ŝteloj de asekurejaj direktoroj. Tiamaniere la klientoj perdis sian monon kaj malhonestaj ĉefdirektoroj misuzis la konfidon de homoj, kiuj aliĝis al asekurejoj. Niajn sukcesojn ni ŝuldas antaŭ ĉio al Sro Karlo Karp, kiu tenis la organizon de nia entrepreno, nia Sinjoro Karp, kiu havis la bonegan ideon kun helpo de la staciestroj meti ĉe ĉiu stacidomo malgrandajn surskribojn, kiuj atentigas trompistojn. Tiamaniera agado tuj fortimigis la krimulojn kaj malebligis al ili la forkuron. Dank' al tiu ĉi agado, ni ekstermas en la mondo malhonestecon. Ni estas fieraj, ke ni bonege plenumis tian gravan mision. La grandegan meriton nature havas nia ano Sro Karlo Karp, kiu per siaj energio kaj kapablo subtenis nian entreprenon. Nun ni petas estimatan Sinjoron Karp, afable prezenti al ni la kalkulon pri la dudek mil dolaroj al li konfiditaj. Per tiuj ĉi vortoj turnis sin la prezidanto al la loko, kie sidis Sinjoro Karp. Sed, ho ve! La loko, kie devus sidi Sro Karp, estimata kaj kara Sro Karp, estis neokupita.

La prezidanto ekmiris. En la granda ĉambro oni aŭdis murmurojn kaj kraĉtusetojn.

Kvazaŭ brogite ekstaris la Prezidanto, kiel unua de sia seĝo kaj iris al la nebruligebla kaso, propraĵo de la organizaĵo, por kontroloj de klientaj garantiaĵoj. Li rapide malfermis la trezorojn kaj ekvidinte ĝian malplenan internon, li kapablis nur flustri „akvon“. Senkonscie li falis en la brakojn de la alkurantaj gastoj. Kiam la mirigitaj gastoj ekvidis la kason, ili ankaŭ rimarkis la karteton: „La escepto konfirmas la regulon. La monon mi bonege uzos kaj bezonas ĝin urĝe“.

Via sindona Karlo Karp“.

## LETERO AL RADIOPRELEGANTO.

Tunagatan 4 B, Upsala, Svedujo.

Pro ĝojego mia koro eksaltis je via afabla saluto: „bonan vesperon!“, kaj kun streĉa atento mi aŭskultis ĉiujn viajn vortojn. Vere bedaŭrinde, ke la radioaparato ne povas per la dankemajn salutojn de la aŭskultantaro, sed kiel rekompencan mi kaptas tuj la okazon letere danki vin kaj esprimi mian esperon, ke ankoraŭ multfoje mi havos la ĝojon aŭdi vian afablan voĉon.

Tute hazarde mi ekvidis la esperantan punkton en la pola radio-programo, sed estu certa, ke nun mi zorgo notis la tempojn por ĉiuj viaj proksimaj dis-

sendadoj, kaj — kiel sveda proverbo diras — „eĉ se plovas ŝtonetoj“ — mi estonte vin aŭskultos.

Estus interese scii, ĉu vi aŭdis niajn svedajn esperanto-dissendadojn, kiuj okazis kvar-foje dum la aŭtuno, kaj kiuj enhavis unue paroladon, poste klarigon de gramatikaj demandoj. Dankemaj ni esperantistoj estas al la radioestraro, kiu donis al ni iom da tempo, sed bedaŭrinde la sendotempo ne estas favora por eksterlandaj aŭskultantoj, ĉar ĝenerale oni ja ne bone aŭdas eksterlandon dum la hela tago, se oni ne posedas eksterordinare selektivon aparaton.

Vian por svedaj oreloj malfacilan no-

mon mi ne perceptis, — sekve mi ne povas en la kongreslibro serĉi vian nomon por vidi, ĉu vi partoprenis nian kongreson. Se vi ĉeestis, vi espereble ricevis belajn impresojn, ne nur pri la kongreso, sed ankaŭ pri nia bela ĉefurbo, kiu vere dum la kongrestagoj montris sian plej brilaspekton.

La kongreso vekis en nia lando grandan intereson, kion atestas multaj novaj esp.-kursoj kun multnombraj partoprenantoj en ĉiu parto de nia longa lando. Nia universitaturbo (loĝantaro 30.000) estas unu el la plej malfacile plugeblaj kampoj por esperanta semado kaj rikolto, sed tamen okazas nuntempe sep kursoj, — komencaj, daŭrigaj kaj unu supera por ekzamendezirantoj. Ne grandnombra estas ĉi tie la kursanaro, sed de multaj aliaj lokoj mi aŭdis raportojn pri kursoj, vizitataj de 90 ĝis 120 kursanoj.

Multaj eksterlandaj instruistoj faris en nia lando tre grandan laboron por disvastigi nian karan interkomprenilon, sed tre lertaj svedaj instruistoj kaj aliaj interesuloj ankaŭ diligente kaj sinofere laboras por nia movado.

La universitatajn klerulojn ni ĝenerale ne sukcesis interesigi por nia lingvo. Ili moke aŭ indulgeme ridetas kaj diras: lernu la anglan lingvon — ĝi estas mondlingvo! — ne pripensante, kiom da tempo kaj mono oni devas oferi por lerni ĝin.

Pasintjare okazis per radio granda, tre interesa diskutado, kiu konsistigis finaranĝon de la serio de radioparoladoj pri anglic, ido, novial, occidental kaj esperanto. La diskutado koncernis la demandon, ĉu iu nacia lingvo povas per internacia interkonsento esti mondlingvo, aŭ ĉu iu artefarita lingvo pli bone solvas la problemon.

La senco de la diskutado estis por la radioaŭskultantoj klarigi la mondlingvan demandon kaj doni al la publiko eblecon mem krei al si propran percepton pri la signifo kaj la senco de la demando. Certe estis malfacile por la aŭskul-

tantaro krei tian percepton, ĉar ĉiuj parolintoj estas meritaj, kaj ĉiu, kiu parolis provis konvinki al la ne-boninformitoj, ke nur li pravas.

La unua, plej interesa parto de la diskutado estis vigla polemiko inter profesoro Zackrisson (anglic) kaj profesoro Collinder (esperanto), kiuj ambaŭ talente eĉ kelkfoje pasie defendis siajn opiniojn pri la lingva problemo.. Certe vi jam antaŭe aŭdis aŭ legis, ke nia Upsala-profesoro Zackrisson, kiu volas simpligi la silabodon en la angla lingvo, ellaboris tute novan silabodon por la lingvo kaj nomas ĝin „anglic“.

Li akre kritikis esperanton, inter-alie dirante, ke esp. estas malfacile lernebla, — ke ĝi estas senrezulta entrepreno, — ke ĝi estas barbara lingvo sen precizeco kaj sen praktika silabado, — ke ĝi ne havas internacian vortfaradan sistemon, — ke oni per esperanto ne povas esprimi tiajn pensnuancojn, kiuj donas al vivanta lingvo medolon kaj forton, — kaj, ke ĉiu artefarita lingvo devas morti en la batalo kontraŭ lia anglic.

Kompreneble li ricevis spertelertan kaj informitan respondon de profesoro Collinder, kiu defendis nian lingvon dirante, — ke la angla lingvo fakte malprogresas eĉ en tiuj landoj, kie la brila flago flirtas, — ke la naciismo kaj la batalema patrujamo malhelpe kontraŭstaras la eblecon akcepti kiel internacian helplingvon iun vivantan lingvon, — ke vivanta lingvo ne taŭgas por kongresoj, ĉar tiu, kiu ne perfekte scipovas la lingvon, ne povas klare kaj konvinkite esprimi siajn pensojn, — kaj: ke la mondlingva demando ne estas unu „hobby“, sed unu el la plej gravaj demandoj de la homaro, precipe nun en nia tion skismigita tempo.

Sed nun mi jam tro suferigis vin per mia babilemo kaj decideme mi abrupte finas mian skribaĵon kun la saluto: „ĝis reaŭdo!“

Altestime kaj samideane

Vera Valberg.

## AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ EN POLUJO,

kiuj konsideras, ke en la Enciklopedio de Esperanto mankas nomoj de meritintoj por nia movado en Polujo, aŭ faktoj, aŭ libroj, aŭ ĝenerale io ajn menciinda, — estas turnita ĉi nuna peto afable alsendi laŭ la suba adreso ĉiun eblan materialon, ĉu biografion, ĉu apartajn faktojn, ĉu sugestojn, ĉu ĝenerale ian ajn menciindan materialon.

Ankaŭ tiuj, kiuj jam troviĝas en la Enciklopedio, sed konsideras, ke intertempe alvenis en ilia vivo novaj faktoj, aŭ ke en la citaĵoj pri ili mankas multo menciinda, estas petataj alsendi korektojn.

Plej dezirinde estus, ke ĉiu alsendu pretan tekston tian, kian li dezirus esti vidonta en la Enciklopedio.

Ankaŭ pri si mem neniu sin ĝenude skribi precize, ĉar ne modesteco estas ĉi-kaze afero plej grava, nur la historia vero.

Dokumentoj kaj fotoj — plej dezirindaj.

Ĉio ĉi estas bezona por la venonta eldono.

**Edvardo Wiesenfeld**

Varsovio, Śniadeckich 13.

P. S. Represado en aliaj gazetoj — tre dezirata.

Mi estus dankema, se iu povus al mi sciigi adreson de miaj gekuzoj Rozenek (el Beżdin, Pollando), kiuj troviĝas en Sovetio.

Adreso: Jakób Scizorik  
Str. Mitre 3498.

**Rosario**  
Argentino.

**Halina Weinstein, Warszawa, str. Leszno 99 m. 5. P.K.O.-konto Nr. 27.867. Tel. 598-37 akceptas abonojn por jenaj gazetoj:**

**Pola Esperantisto** jare zł. 8.—; duonjare zł. 4.—; kvaronjare zł. 2.—; opa numero zł. 0.70.

**La Praktiko** jare zł. 8.—; duonjare zł. 4.—; opa numero zł. 0.70; abona jaro komenciĝas en januaro kaj julio.

**Literatura Mondo** jare zł. 15.75; duonjare zł. 8.75; opa numero zł. 1.75.

**Lingvo-Libro** (kvaronjara gazeto) jare zł. 1.40; opa numero zł. 0.35.

**Ondo de Daŭgava** jare zł. 2.20; opa numero zł. 0.20.

**Informoj de Esperanto-Asocio en Estonio** jare zł. 2.20; opa numero zł. 0.20.

Nur ĉe mendo de unuopaj numeroj aldonu por poŝtelspezoj 10%, minimume zł. 0.10. Aĉeteblaj ĉiuj eldonaĵoj de Pola Esperantisto, Literatura Mondo, La Praktiko k.t.p. Sendante monon bonvolu precize indiki la celon de la enpago. Por korespondaĵo aldonu poŝtmarkon.

**RIMARKO:** aĉetebla kaj mendebla ENCIKLOPEDIŬ DE ESPERANTO. Detalaj prospektoj pri la Enciklopedio, katalogoj

Literatura Mondo kaj prospektoj pri aliĝo al AELA (Asocio de Esperantistaj Libro—Amikoj) estas dissendataj senpage. Aliĝojn al AELA kaj mendojn por la libroj kaj abonon por Literatura Mondo sendu al la supre montrita adreso.

La plej grandioza verko de nia literaturo **ENCIKLOPEDIŬ DE ESPERANTO** ambaŭ volumoj estas fine pretaj. En la redakto de L. Kókény kaj V. Bleier, ĝi ampleksas sur siaj grandformataj 900 paĝoj, kies triono estas ilustraĵoj, la tutan historion de nia movado, kun ĉiuj ĝiaj detaloj, per densa komposto.

**Nemalhavebla libro por ĉiu serioza Esperantisto**

bind. broŝ.

Prezo de ambaŭ volumoj

sv. fr. 34.— 30.—

sen ilustraĵoj

sv. fr. 20.— 18.—

plus 10% por sendkostoj.

AELA-serio 1933, kun ambaŭ volumoj de Enciklopedio kostas por novaj AELAnoj sv. fr. 33.50 afrankite kun kvar aliaj volumoj.

Por AELA-anoj 40%-a rabato!

Detalan prospekton sendas al vi Admin. de „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34.

**LA 28-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS LA 8—15 DE AŬGUSTO 1936 EN WIEN!**

**PRI LA POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO.**

La prokrastita kongreso okazos en Krakovo. La organiza komitato, dezirante plenumi dezirojn de interesatoj, petas ĉiujn grupojn kaj partoprenontajn izolulojn proponi la plej konvenan por ili daton, kiam la kongreso okazu.

**Pollanda Esperanto-Delegitaro,**  
Kraków, Lubicz 34.

**RENOVIGU LA ABONON  
POR JARO 1935!  
PAGU TUJ JE NIA KONTO  
P. K. O. 406.660.**

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.—	ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—
Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.—	Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.
OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.—	1/4 strony zł. 15.—
1/8 strony zł. 10.—	Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.	KONTO P. K. O. NR. 406.660